



SVEIKI !

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

16 Aŭgusto 2005

№ 11

Redaktoro: Araneo

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
FAX: (708) 456-2750

Estraro:

Prezidanto – Roberto Stalzer
Vicprezidanto – Karlo Offutt
Sekretario – Viktoro Pajuk
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of our Society.
Check should be payable to:
The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our
Treasurer, Charles Gunn,
828 S. Ada, Chicago IL 60607

Kunvenoj:

Membroj de la Ĉikaga Esperanto Societo kunsidas ĉiun kvaran merkredon de monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Avenue, Ĉikago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.


Bonvenon!

Sveiki, estimata leganto! Jam denove mi salutas (*sveiki* estas litova vorto por la titolo de nia bulteno *Saluton!*) vin sur la paĝoj de nia societa periodaĵo! Ŝajnas hieraŭ mi konigis vin pri planoj viziti la plej gravan ĉi-jaran E-eventon – UK en la litova ĉefurbo Vilno, kaj jam ĝi, la 90-a Kongreso fariĝis nia historio. Do, mi rakontos al vi pri miaj impresoj, sed mallonge. Se vi volus ekscii pli da, bonvolu viziti nian lastan someran kunvenon.

Neforgesebla UK en Vilno

Por mi Esperantio komenciĝis la 22an de Julio, kiam mi eniris internacian flughavenon O'Hare, proksimiĝis al elirejo de LOT-kompanio kaj... ek-aŭdis nian karan lingvon: la saman flugon atendis s-roj R. Swenson el najbara Viskonsino kaj A. Mills el Teksaso. Iom poste en Varsovio aliĝis al ni poloj, vjetnamoj kaj d-ro L. Zaleski-Zamenhof.

La ĉi-jara UK estis double jubilea: de unu flanko ĝi estas 90-a, sed de la dua flanko, antaŭ cent jaroj okazis la unua forumo de adeptoj de Internacia Lingvo en la franca urbeto Bulonjo-sur-Mar. Ĝuste pri ĝi diris nia Majstro, ke kolektiĝis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Kaj en Vilno jubileis pli ol 2300 homoj – esperantistoj el 63 landoj de l'mondo. Solena inaŭguro okazis en salonego "Siemens-Arena". Bedaŭrinde malfermis kongreson ne ĝia alta protektanto, prezidento de Litovio V. Adamkus, kiu eskapis al Kovno, sed anstataŭigis lin la litova ministro pri eksterlandaj aferoj. La solena malfermo pasis rapide kaj malenue. Vespere ni havis eblecon denove viziti la imponan kogresejon, kie ni ĉeestis du-partan Nacian vesperon.



Litovoj ege bone preparis la Kongreson, pli ol 500 el ili aliĝis al forumo; estis emisiita poŝtmarko kun portreto de L. Zamenhof kaj emblemo de la UK; estis eldonitaj multaj E-libroj, deko da ili estis tradukitaj litove; ĉiu tage aperies kongresa kuriero *Vilna Sonoro*. Libroŝatantoj po kelkfoje tage havis eblecon renkontiĝi kun famaj (kaj ne nur) E-aŭtoroj.

Abundis spirita programo (kelkaj katolikaj diservoj), kultura – muzikkoncertoj kaj teatraj prezentoj, por nur listigi ĉiujn movadajn aranĝojn mankos spaco en nia bulteno. Kiel kutime, la tuta merkredo estis dediĉita al tut- kaj duon-tagaj ekskursoj. Esperantistoj-poliglotoj havis eblecon lerni fundamentojn de litova lingvo.

UTILAJ ADRESOJ EN LA RETO:

Esperanto.Net –

Home of a comprehensive FAQ list

http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course;

toll free: 1-800-ESPERANTO

(1-800-377-3726)

<http://www.esperanto-usa.org/>

UEA – The Universal Esperanto Association

<http://www.uea.org>

Free Esperanto Course on Internet

<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course

<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/angla/index.htm>

Esperantic Studies Foundation

<http://esperantic.org>

Pasporta Servo

<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

AERA - Esperanto radio broadcasts in RealAudio format

<http://osiek.org/aera/en.html>

Pola Radio en Esperanto:

<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

24an de Augusto – membroj de la societo raportos pri sia freŝa sperto en **Esperantio-05**

28an de Septembro – gvidos d-ro Puramo Chong, temo estos anoncata

26an de Oktobro – reelekta kunveno: ni sumos la jaran agadon kaj estraro raportos pri sia aktivado; kune ni ellaboru planojn por la 2006 jaro

Ĉu ankaŭ ĉi jare ni festos Ago-Tagon kune kaj pasigos du oktobrajn tagojn en E-etoso dum la Kolumba tago? (reeĥu)

Eternaj studentoj havis eblecon viziti altnivelajn fakajn prelegojn de 58-a sesio de Internacia Kongresa Universitato kaj mi persone ĝuis akcepton de vilna urbestro Arturas Zuokas, kiu okazis en historia malnova Urbodomo de Vilnius: koncerto de ĉambra ebsemblo, brulantaj kandeloj, sandviĉoj kaj vino-brando.

Oni povas demandi, kial homoj vizitas similajn aranĝojn anstataŭ ripozi sur marbordo aŭ en montaro? Mi trovis respondon en kongresa gazeto

Kial UK?

Kial kongresanoj malfruas en kunsid'?

Kial homoj flustre diskutas dum preleg'?

Kial homoj ĉiam saketsusuras dum koncert'?

Kial deĵorantoj diskutas ĉe ĝiĉet'?


Kial neniu respondecul' surŝultras programerar'?

Kial malgraŭ ĉio mi ŝatas la interhomar'?

Ĉar, jes ja ĉar UK donas senton Esperantistar'!

La poemon verkis germano Helmut Sebastian.

Kongresero No. 1



Sendube vi konsentos kun mi, ke la plej grava programero de la pasinta UK estis nek inaŭguro, nek IKU, nek ekskurso tra Litovio, Latvio kaj Estonio, sed... Rigardu la apudan foton! Dum la unua oficiala kongresa tago – dimanĉo – okazis evento, kiun ni, membroj de E-societo de Ŝikago atendis dum la tuta

pasinta jaro. Ĉu vi memoras raporton de nia prezidanto pri UK en Pekino, ĉu vi aŭskultis lian rakonton pri tri-semajna marta restado en la irana ĉefurbo – Tehrano (vidu antaŭajn numerojn de *Saluton!*)? Jes, vi pravas: en Litovio gefianĉiĝis Roberto kaj aktivulino de persa E-movado Sapide. Espereble, post iom da tempo nia societo eĉ pli internaciigos. Sed nun, Roberto, bonvolu akcepti la plej korajn bondezirojn kaj pacience atendu baldaŭan unuiĝon kun la Damo de via koro! Ni ĉiuj sincere gratulas vin! Ŝaŭmvinon – en klubon!

Lastmomente...

Kiam ĉi numero de nia bulteno estis preskaŭ finpreparita, atingis redakcion informo de nia vic-prezidanto Karlo, kiu mallonge rakontis pri la lasta klub-kunsido. Malgraŭ foresto de multaj anoj de la societo, kiuj kongresis en Litovio, sub la gvido de Karlo okazis kunveno la 27an de Julio, kie estis daŭrigita temo de amikaj rilatoj kun tanzaniaj gesam-ideanoj. Ankaŭ nia biblioteko invitas nin ĉiujn uzi ĝian riĉan stokon de vidbendoj. Bonvenon al biblioteko kaj ĝis LA revido en nia ejo la 24an de Aŭgusto je 7 p.m.

Por vi serĉis la novaĵojn de la tuta E-mondo redaktoro kaj via obeema servanto. Estu sanaj kaj feliĉaj en ĉi maltrankvila mondo!



araneosp @ yahoo.co.uk